

N. N. 32, Rozbranĉo forĝermadis	N. N. 32, Burĝonis ro- zarbedo	N. N. 32, Elkreskis roz- branĉeto	N. N. 32, En rose så jeg skyde
<i>tradukita de Felix Ney</i>	<i>tradukita de Guido Holz</i>	<i>tradukita de Joachim Gießner</i>	<i>tradukita de Thomas Laub</i>
Rozbranĉo forĝermadis el trunk' de nobelec'. Prauloj jam kantadis: de Jiŝaj ĝia spec'. Floreton portis ĝi, en akra vintro estis, Je horo de noktmez'.	1. Burĝonis roz- arbedo el delikata sin' laŭ olda kant-heredo, Jiŝaj la origin'; ekĝermis ĉarma flor' dum frosta vintro- tempo je noktomeza hor'.	1. Elkreskis roz- branĉeto el rozarbust' de Di'. Aŭguro de profeto rakontis jam pri ĝi. Naskiĝis rozfloreto' meze en vintra nokto laŭ diro de profet'.	En rose så jeg skyde op af den frosne jord, alt som os forðum spåde profetens trøsteord. Den rose spired frem midt i den kolde vinter om nat ved Bethlehem.
La branĉo anoncita Jesaja de profet': Maria netuŝita, de kiu la floreto'. Eterne volis Di': naskinta infaneton Plej pura restis ŝi.	2. El virgulin' beata, mirinda roz-arbed', elvenis flor' benata laŭ diro de profet'. Laŭ sankta Di-ordon' ŝi naskis infaneton por nia sav' kaj bon'.	2. Ja naskis tiu rozo - Jesaj' prognozis ĝin - el sia korpo sproson Mari' la virgulin'. Laŭ dipotenca vol' ŝi naskis Di-infanon por tuta mond' kon- sol'.	For rosen nu jeg kvæder omkap med Himlens hær: en jomfru var hans mo- der, Maria ren og skær. I ham brød lyset frem midt i den mørke vinter om nat ved Bethlehem.
De tiu eta floro alvenas bonodor' Ĝi brilas en la koro, mallumon pelas for. Homido, Dia Vort', nin el sufero helpas, De pek' Savant' kaj mort'.	3. Kaj ĉi floreto belas, amindas per parfum'; la nokton ĝi forpelas per sia brila lum', nin helpas el mizer', el pek' kaj morto sa- vas; Li, hom' kaj Di' en ver'.	3. Kaj tiu belfloreto tre hele lumas ĝi. Obskuron la brileto forprenas nun de ni. Vi hom' kaj vera Di' el pekoj kaj suferoj estas savant' por ni.	Den rose fin og lille har dejlig duft og skær, den lyse for os ville og sprede mørket her. I sandhed mand og Gud, af syndens nød og pine han nådig hjalp os ud.
...

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbranca1.html>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en la Danan de Thomas Laub.

Arg-618-1249 (2012-10-19 19:29:42)

Tiu ĉi danigo de la kanto troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Vidu ankaŭ: http://da.wikisource.org/wiki/En_rose_s%C3%A5_jeg_skyde_kaj http://www.ugle.dk/en_rose_saa_jeg_skyde.html. Pri Thomas Laub vidu la retejn http://de.wikipedia.org/wiki/Thomas_Laub.